Yale

## Yale University Library Digital Collections

| | |
|---|---|
| **Title** | Verda Revuo, April 1935. Complete issue of Esperanto journal. With crossword puzzle and “Esperanto en la lernejo.” [8039-1] |
| **Call Number** | GEN MSS 475 |
| **Published/Created Date** | 1935 {id=286426} |
| **Collection Title** | "Libroni" on futurism : slides. |
| **Rights** | The use of this image may be subject to the copyright law of the United States (Title 17, United States Code) or to site license or other rights management terms and conditions. The person using the image is liable for any infringement |
| **Extent of Digitization** | Complete work digitized. |
| **Container information** | Box 101 \| Slide: 59 |
| **Generated** | 2021-06-24 17:42:30 UTC |
| **Terms of Use** | https://guides.library.yale.edu/about/policies/access |
| **View in DL** | https://collections.library.yale.edu/catalog/10661769 |

# AMUZA ANGULO.

Ni prezentas al niaj ŝatataj abonantoj suban krucvortenigmon. La unuaj 100 solvantoj ricevos imponan Esperantoinsignon (verda stelo sur blanka fono). La solvoj estu skribataj sur korespondkarton kun respondkarto. Ni kore dankas al nia ŝatata s-ano Foltanek pro donaco de insignoj.

## Krucvortenigmo (de Eigner August).




**Horizontale:**

1. Laŭregula stato. 4. Parenco. 8. Konstruaĵa materialo. 10. Imperia rusa dekreto. 11. Malpara nombro. 12. Persona pronomo (akuzativo). 13. Prepozicio. 14. Lirika versaĵo. 16. Besto el la familio de l' bovoj. 19. Alta grado de inklino. 21. Havanta respekton al Dio. 24. Konjunkcio. 25. Duan fojon. 26. Sole. 27. Nigra ligno. 29. Vere ekzistanta. 31. Plieńka oksigeno. 32. Amerika ŝtato.

**Vertikale:**

1. Loĝejo de la birdoj. 2. Hunda malsano. 3. Dekoble cent. 5. Konjunkcio. 6. Lernejĉambro 7. Ekscitas la flarsenton. 9. Manĝaĵo. 10. Nombro. 15. Prepozicio. 17. Maceri tekseblan planton. 18. Akiro per pago. 19. Bonodoro. 20. Metalo. 21. Prepozicio. 22. Korta naĝbirdo. 23. Fabela monstro. 28. En ĉi tiu tempo. 30. Prefikso.

## Solvo de la enigmoj de nro. 3

**I. Ĉevalsaltado:**

La popoloj faros en konsento
Unu grandan rondon familian.
Nia diligenta kolegaro
En laboro paca ne laciĝos
Ĝis la bela sonĝo de l' homaro
Por eterna ben' efektiviĝos.

**Zamenhof.**

**II. Enigmoj:**

1. ovo, avo.
2. cervo, cerbo.
3. magazeno.

Abonu tuj la popularsciencan dumonatan gazeton

**Scienca Gazeto**

Ĝi aperas sur 20 dense presitaj paĝoj kaj kovrilo. Plua pligrandigo projektata. Enhavas multegon da informoj sciencaj en facile legebla lingvo.

**Jarabono: 5·40 ŝ, pageblaj ĉe V. R.**

Specimeno kontraŭ respondkupono.

Mendebla ĉe

**Amerika Esperanto-Instituto**

556 State St., Madison, Wis., Usono.

# ESPERANTO EN LA LERNEJO.



Esperantokurso en la metiaj klerigaj lernejoj en Linz a. D., Aŭstrujo.

Laŭ dekreto de la Linz-a urblerneja konsilantaro estis enkondukata Esperanto kiel libervola instrufako jam ekde jaro 1930. La kurson partoprenis 45 gejunuloj, kiuj kun granda fervoro lernis nian lingvon. Bedaŭrinde ĉijare la kurso estis ĉesigata pro manko da mono. Oni promesis, ĝin daŭrigi dum pli favora tempo. La kurson nun gvidas nia kuraĝa propagandisto s-ano Mraz tute private.

La bildo prezentas tiun Esperantokurson. En la mezo ĉefdirektoro prof. F. Rossmann. Maldekstre fakinstruisto F. Ferschner kaj dekstre la gvidanto de la kurso, fakinstruisto s-ano J. Mraz. Ni elkore gratulas al li pro la granda sukceso.

# El proksimo kaj malproksimo.

### Antaŭ 30.000 jaroj.

Historia Instituto de USSR lastjare sendis grandan ekspedicion en la regionon de la riveroj Volga kaj Don, tre riĉan je tumulusoj k. a. antikvaj monumentrestaĵoj, ne nur de la bronza, sed eĉ de la paleolita epoko (antaŭ 30.000 jaroj).

Apud la stacio Cimlanskaja troviĝas ruinoj de Sarkel, ĉefurbo de la Kazara regno (8—9-a jarc.) Ĝi estis konstruata de bizantiaj inĝenieroj kaj estas konata en la historio sub la nomo,Belaja beja', kiun Svatoslav konkeris kaj detruis en la 10-a jarcento. La ekspedicio trovis restaĵojn de tiu epoko (hejman inventaron, k. a.)

Tiuj ĉi trovitaĵoj ebligas solvi la problemon pri la antikva Kazara regno, kiu estis ligilo inter la okcidento kaj la oriento.

La alia granda ekspedicio laboros en la regiono de Angara. Ĝi elfosos la t. n. „maltinan" loĝlokon, kiu donis en 1930 unuafoje en USSR paleologiajn tombojn — kies aĝo eble estas 25—30 mil jaroj — kaj grandan kvanton da objektoj faritaj el mamutostoj.

(Kolobaŝkin – Scienca Gazeto).

### Eskimo-gazeto.

La unua gazeto por eskimoj aperas nun en la sud-grenlanda urbo Julianahaab. Ĝia redaktoro kaj posedanto estas juna eskimo, kiu studis kaj laboris en Usono. La gazeto aperas en lingvo eskima ĉiusemajne kaj havas ĝis nun jam pli ol 1000 legantojn.

### Kiom da muzikiloj ekzistas?

Laŭ publikaĵo de la muzeo por muzikiloj en Detroit (Usono) ekzistas 1673 diversaj muzikiloj. La nomita instituto jam enhavas fakte 1629. Pri la malmultaj, ankoraŭ ne viditaj, ekzistas ekzaktaj notaĵoj.

### Malkara aĉeto.

La insulon, sur kiu hodiaŭ staras la mondurbego Nov-Jorko, akiris la unuaj ĉi tieaj koloniistoj je ridinda prezo. La indianoj forvendis ĝin al la holandanoj por: 10 ĉemizoj, 30 paroj da ŝtrumpoj, 10 pafiloj, 30 kugloj, 30 funtoj da pulvo, 30 hakiloj, 30 kaldronoj kaj 1 kupra pato. Kaj la naivaj ruĝhaŭtuloj tamen kredis per la forvendo esti farintaj brilantan negocon.

*Al demandoj bonvolu aldoni respondafrankon!*

*Sen tio ni ne povos respondi.*